

& Foje en konfuza horo:

< Rekante 36 el 71 batoj por strofo, entute 568 paŝoj dum 7 minutoj. Verkis Stanislav Schulhof (1911) kun moto "Ekzistas ja fonto, se oni trinkas el ĝia akvo, ĉiu estintaĵo malaperas el la memoro. Kiu al mi montrusla vojona la fonto? (El "Akvo de forgeso" de Rd. Baumbach-M. Hankel.)". Baladigis Martin Strid (2016) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por Recepto por fari bonajn versaĵojn.>

(#Melodio:

/MiMi LaLa SoSo LaLa doTi La So; dodo TiTi dodo rere sofa mi do; mimi redo TiLa TiTi doTi La Mi; mimi redo TiLa TiTi doTi La Mi; dodo TiTi dodo rere sofa mi do;

(#Rekantaĵe: Mi La So oLa doTi La So; do Ti do ore sofa mi do; mi redo TiLa Ti doTi La Mi; Mi La So oLa doTi La So; do Ti do ore sofa mi do o))×8)+

(&Strofoj:

'1 /Se mi scius, kie en la vasta mondo ;
mi vin trovi povus, akvo de l' forgeso! ;
Tuj mi al vi irus trans plej krutaj baroj,
; trans plej fremdaj landoj, trans plej
ruzaj maroj, ; ankaŭ se vi estus ie en
Hadeso.

(×: **Emas mi poeme paŝi ; per piedoj plankon draŝi ; kaj en la ve2rsoj mi2n kaŝi ; Emas mi poeme paŝi ; per piedoj plankon draŝi.**)

'2 Amo plej terura koron mian premas,
; amo sen espero, amo sen sukceso, ;
sen la ĉirkaŭprenoj kaj sen
rekompenco, ; amo al fantom' sen
korpo kaj esenco - ; Kie vi nur estas
akvo de l' forgeso?

'3 Se virin' ĝi estus kun la roz' sur
vango ; kaj kun sango en la vejnoj
cirkulanta, ; ho, mi prenas ŝin al mia
seka brusto ; kaj sur ŝia blanka,
delogema busto ; trankviliĝus mia koro
soifanta.

'4 Se patrin' ĝi estus, kies flamajn
kisojn ; mi ankoraŭ sentas sur la buŝ'
kaj vango, ; en la tombon ŝian mi tuj
volus iri ; kaj al ŝiaj teraj restoj ĉion
diri, ; por ke ĉesu ardi mia kor' kaj
sango.

'5 Ho ve, malfeliĉa estas mia amo - ! ;
Al homaro, al fantomo nereala ; vane
mi la brakojn miajn nun etendas, ; vane
mi la kisojn al ĝi ardajn sendas, ; vana
estas mia lingvo neŭtrala.

'6 Vane en la brusto vibras mia koro, ;
malbenita am' al vorto sen enhavo! ;
Kantojn miajn ĝi ja tute ne komprenas,
; vane en la revoj mi ĝin ĉirkaŭprenas, ;
strangan homan aron kun la sang' sur
glavo.

'7 Ve al homoj, kiuj en flamemaj koroj
; portas tiun amon vanan sen la ŝanco! ;
Homaj restoj putras en la Manĝurio, ;
sang' ankoraŭ fluas sur la Kalvario ; kaj
la flam' ne ĉesis fumi en Konstanco.

'8 Se mi scius, kie en la vasta mondo ;
mi vin trovi povus, akvo de l' forgeso! ;
Tuj al vi mi irustrans plej krutaj baroj, ;
trans plej fremdaj landoj, trans plej
ruzaj maroj, ; ankaŭ se vi estus ie en
Hadeso.)